

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

<http://www.gazetoteko.eu/hale/k77.pdf>



**Ĝis ĉiam,
amiko mia!**

Nro 77a

Majo de 2009

Redaktore



Manko

De unu jaro nia magazino ne venis antaŭ vi, leganto. Tio okazis pro diversaj kialoj, sed la problemo estas, ke ne temas pri la unua fojo. Mi klopodos, ke tio ne plu okazos.

Lastan numeron ni funebriis pri grava esperantisto Kłod Piron'. Nun ni funebrias pri elstara esperantisto Ĝordano Moja, nia plej konstanta kunlaboranto. Multas la numeroj de Kajeroj el la Sudo, kiuj enhavas liajn artikolojn. Ni republikigas la elegion, kiun samideano Salvador Aragaj' publikigis en la lasta numero de Boletín, 386. Por la venonta Kajero mi pretigos bukedon da artikoloj de nia amiko Ĝordano.

Esperante, ke vi tamen ĝuos la legadon de nia magazino, unufoje pli salutas vin

Jesuo

Parolas la Prezidanto

Estimataj HALEanoj!



La krizo estas krizo por malriĉuloj sed la profito de la tutmondiĝo estas por la riĉuloj.

Antaŭe, tiuj kreduloj de maldekstro diris «mi ne volas tutmondiĝon, ni volas alian politikon, alian socion».

Kiel kredantoj ili kredas siajn patronojn, la partion de la maldekstro, sed vera homo de maldekstro, vera homo progresema devus diri “mi ne volas tutmondiĝon, per tio ĉi mi havas tiun ĉi solvon.

Mi ne vidas maldekstran solvon, mi nur vidas dekstran solvon: «rabati salajron, malpli da laboro, pli da malsekureco».

Kaj mi mindemandas «Kie estas la maldelstraj homoj?»

Se vi vidas la televidon vi povas vidi, ke la maldekstra estraro de Hispano donas monon al bankoj kaj al entreprenoj sed ne ŝanĝas la kontrolon pri tiuj entrepeno, al kiuj ili donis monon.

La politiko de tiu maldekstro estas tro simpla: «mi donas monon, nian monon, al bankoj kiuj ne scias labori kiel bankoj».

Kaj mi admiras usonan popolon, kiam ili per manifestacio diras «nia mono ne estas por bankoj!», eĉ se ili devas malaperi.

Sed la bankoj ne malaperis, kaj la stabanoj de la bankoj disdonas inter ili la monon de la popolo. Tio havas nomon : fraŭdo.

*Johano Cabezas,
Prezidanto de HALE*

Mortis Giordano Moja

Ĝordano Moja naskiĝis en la urbo Teraso (Terrasa aŭ Tar-rasa), apud Barselono, Hispanio, la jaron 1915, kaj forpasis en Teraso la 15-an de februaro la jaron 2009.

Lia patro estis kampa-

rano anarĥiisto, sed

tre diktatorema

ene de la fa-

milio, tiel

ke Ĝorda-

no ankaŭ

akceptis

la patran

ideon.

En la ju-

naĝo li

lernis Es-

peranton je

la jaro 1936

kaj partoprenis

en diversaj politikaj

kaj kulturaj asocioj de

Teraso. Post kelkaj jaroj li

komencis konstati, ke per la

perforto, violento kaj detruo

de entreprenoj, preĝejoj kaj

fabrikoj oni ne solvos la problemon de la socio. Mi devas menciigi, ke en tiu epoko, agrokulturo kaj la teksaĵa industrio estas la solaj ebloj.

La patro decidis krei kaj or-

ganizi kokine-

jon, la afe-

ro tre

suk-



kaj partoprenis

en diversaj politikaj

kaj kulturaj asocioj de

Teraso. Post kelkaj jaroj li

komencis konstati, ke per la

perforto, violento kaj detruo

de entreprenoj, preĝejoj kaj

decis

kaj atingis

pli ol dek mil

kokinojn dum kelkaj jaroj.

Dum la Intercivitana Hispana

Milito, de 1936 ĝis 1939, la

plimulto el la gelaboristoj

estis analfabetoj, pro tio Iom post iom la politikaj Ĝordano estis elektita de la respublikaj aŭtoritatuloj de Teraso prezidi agrokulturan kaj industrian organizojn. Dolores; naskiĝis du filinoj, Flora kaj Aŭrora, kaj li studis en la milito en Aragono apud Katalunio. Pro tio, ke li eĉ ne sciis nek deziris pafi, li estis malliberigita kaj juĝita de la respublika armeo.

Li kaj amiko eskapis el barako kaj dum kvar tagoj piede vojaĝis nokte ĝis Teraso.

Li kaj amiko eskapis el barako kaj dum kvar tagoj piede vojaĝis nokte ĝis Teraso.

Kompreneble li devas vivi kaŝe, sed surprize, kiam la armeo de Franko eniris la urbon, li estis ankaŭ en la listo de persekutitoj pro lia agado kiel prezidanto de kelkaj organizoj. Tiel do, li devis kaŝi dum ses jaroj en la koki-nejo kaj aliaj lokoj de la bieno.

Li pasis la menciitaj ses jaroj legante kaj studante historion, matematikon, astronomion, Esperanton, Homaranismon, internacian ideon, kaj tiel plu.

Iom post iom la politikaj Ĝordano estis elektita de la respublikaj aŭtoritatuloj de Teraso prezidi agrokulturan kaj industrian organizojn. Dolores; naskiĝis du filinoj, Flora kaj Aŭrora, kaj li studis en la milito en Aragono apud Katalunio. Pro tio, ke li eĉ ne sciis nek deziris pafi, li estis malliberigita kaj juĝita de la respublika armeo.

Esperanta agado. Je 1951 okaze de la unua Hispana Kongreso de Esperanto en Teraso post la milito, li partoprenis tre aktive kaj aliĝis al Hispana Esperanto Federacio kaj Universala Esperanto Asocio kiel fakdelegito pri etiko ĝis 2005, kiam lia malsano ne permesis al li daŭrigi sian esperantan agadon. Kompreneble, li kaj sia edzino partoprenis ĉiujn hispanajn kongresojn de Esperanto, barselonan esperantorenkontiĝo kaj Universalajn Kongresojn en Madrido (1968), Vieno (1992), Valensjo (1993), Tempere (1995).

Li verkis kaj publikigis unue en la kataluna lingvo, rakontante sian vivon ekde la Dik-




tatoreco de Primo de Ribera, la Respubliko, la Intercivita-na Milito kaj la Diktatoreco de Franko. Laŭ li, **L'Aventura Humana** estas krio favore al libereco kaj digneco de la homo, kaj kontraŭ la milito kaj la armitaj perfortaj revolucioj. Novan projekton li preparis nomita *Sociala-Humanismo*, kaj eldonis bulte-

non por prezenti internacie siajn pensojn, sed post kelkaj jaroj la projekto ne sukcesis kaj li decidis dediĉi sian tempon nur al la verkado de prelegoj kaj verkoj en Esperanto, ĉar li konstatis, ke la politika situacio ne estis favora por daŭre verki en la kataluna. En tiu epoko li estis vicsekretario de Barcelona Esperanto Centro.

Li reverkis la unuan verkon laŭ la titolo **La homa vivaventuro** je 1987, kiun nia centro

decidis eldoni. Je 1989 aperis **Esperanto en Prospektivo**, je 1995 **Survoje al Universala civilizacio**, kaj je 2002 **Esperantismo: prelegoj kaj eseoj**.

Jam je la jaro 1985 la estraro de Hispana Esperanto-Federacio kun sidejo en Valjadolido, petis al la Barselona



Esperanto-Centro akcepti la Federacion en Barselono, tuj, mi kontaktis kun Ĝordano Moja kaj li akceptis la postenon de redaktoro de Boletín de HEF kaj mi la postenon Prezidanto. Tiu kunagado daŭris kvin jarojn. Multe pli oni povus paroli pri la Esperanto-agado de Ĝordano Moja..., ekzemple en ĉiuj kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj, li verkis prelegojn por diversaj revuoj jkiel **La Gazeto**, **SAT**, **Boletín**, kaj tiel plu. Liaj

obstinaj ideoj ĉiam estis la edukado de la personoj, la eblo de ĉiu persono decidi sian propran vivon, labori kontraŭ ĉiuj militoj kaj perfortaj revolucioj, forigi la landlimojn inter la ŝtatoj. . Li opiniis, ke per la perforto nenion oni solvos. La geesperantistoj ne devas krei propran nacion aŭ landon, kontraŭe, ĉar jam ekzistas tro da landoj kaj landlimoj. Plaĉis al li la kreado de Eŭropa Unio, ktp.

Salvador Aragay

Unue publikigita en Boletín n^o 386



Kurso pri Informadiko

1 Unuaj paŝoj.


Ni devas esti dirinta al nia komputilo, ke kiam oni startu ĝin, la komputilo devas legi unue la legilon por kompakto-disko, kaj poste la aliajn legilojn. Se ne, la komputilo komencos kiel kutime. La maniero fari tion estas diversa laŭ la diversaj komputiloj, sed ĝenerale oni povas diri, ke komencante la komputilon, oni povas premi la klavon **Supr** (forviŝu) tuj kiam diversaj literoj aperas kontraŭ nigra ekrano. Tuj aperos menuo, kie ni devas serĉi la vorton **Boot** aŭ io simila. Oni devas vidi kiel meti je la komenco de la listo prezentata al ni la vorton **Cd drive** (cd-diskejo) aŭ similan nomon. Poste ni devas *fermi* la menuon *konservante* la novan ordonon, kutime per premo de la klavo **F10**. Ni supozu, ke vi jam faris tion. Nun, se vi ankoraŭ ne tion faris, metu la diskon, kiun ni donacis al vi kune kun ĉi tiu magazino lastan fojon, aŭ kiun vi ekhavis per alia maniero de ni priskribita tie, kaj faru tiel:

Restartu la komputilon tuj kiam la disko de Ubuntu jam estas en la legilo. Post kelkaj sekundoj vi vidos ekranon kun menuo en la angla. Vi premu la klavon **F2**, kaj vi vidos multe da lingvoj, ĉirkaŭ 50. Premu la klavon kun sago suben, kaj kiam *Esperanto* estas selektita (aŭ la hispana, aŭ via naskiĝlingvo, ĉar ne ĉio estas tradukita en Esperanton, kaj la ne ankoraŭ tradukita parto estas en la angla), premu **Intro**, kiu estas la klavo per kiu oni jesas la ordonon jam dirita en nia komputilo, aŭ tiun kun la vorto **Intro** en la numera klavareto. Nun vi elektu la unuan eron en la menuo, *Komenci*

aŭ *instali Ubuntu-n*, kaj denove premu **Intro**. La maŝino nun laboras silente, kaj post kelke da minutoj, vi vidos la bonvenigan ekranon de la *operaciumo* aŭ operacia sistemo. Vi jam faris la plej malfacila tasko en Linukso!

La ekrano havas du barojn, unu en la alto kaj alia en la malalto. Sur la alta baro estas tri eroj: Programoj, Lokoj kaj Sistemo. En la malalta baro aperos la diversaj programoj aŭ fenestroj, kiuj malfermiĝos dum nia komputilado. Je la plej dekstra parto de tiu malalta baro estas du grizaj fenestretoj. Ili reprezentas la du *spacojn de laboro* aŭ *skribejoj*. Ni lokiĝu la *muson* sur unu el ili, kaj premu ĝian dekstran klavon, kaj elektu *Preferoj*. En la fenestreto, kiu aperas, ni elektu *Spacojn de laboro* (área de trabajo), kaj musklaku sur la supra sageto ĝis kiam ni vidu, ke ne plu du, sed kvar spacoj aperas tie. Dekstre de ĝi estas bildeto, kiu reprezentas tirkeston aŭ rubingon. Ĉio, kion ni forviŝos, iros al tiu loko, tiel ke ni facile povos rehavi ĝin denove.

En la supra baro, rekte kontraŭ la tirkesto, estas kelkaj aferoj. Plejdekstre estas ruĝblanka simbolo, kiu permesas al ni malŝalti la maŝinon facile, per musklako tie. Maldekstre al tiu simbolo aperas la horo kaj dato, kaj maldekstre al ili estas simbolo pri interreto, se nia komputilo estas konektita al ĝi, kaj indiko, ke ni uzas *vivan* version



de la operaciumo.

Inter ambaŭ baroj estas granda zono. Tie aperas du bildetoj aŭ *ikonoj*: unu el ili nomiĝas *Ekzemploj*, kaj la alia *Instalado*. Musklakinte la unuan, aperas diversaj dokumentoj per teksto, sono kaj video. Ili estas en la angla, kaj elstaras inter ili intervjuo al Nelson Mandela, kies dokumentotitolo estas *Experience Ubuntu* (spertu Ubunton).

Se oni uzas la diversajn erojn de tiu ĉi menuo, Programoj (*Aplicaciones*, en la hispana), oni konstatos, ke estas multaj la aferoj, kiujn oni jam povas fari per la kd-romo, kiun oni ekhavis per nia antaŭa numero de ĉi tiu magazino. Inter ili, laŭ mia opinio, estas produkti tekstojn. Ni havas tutan oficejopakedon, *OpenOffice*, tio estas, malferma oficejo. Ni koncentriĝu pri tio nun.

Ni musklaku *Programoj-->Oficejo-->OpenOffice Procesador de teksto* (tekstprilaborilo). Post kelkaj sekundoj, ni vidos ŝildon, kiu informas nin pri la versio (2.3) de la programo, kaj finfine ni vidos novan fenestron, kiu ŝajnigas blankan paperon. Alte al ĝi estas la vortoj *Untitled - OpenOffice.org writer*. Tio signifas, ke ni ankoraŭ ne konservis la dokumenton, kaj sekve ni ne nomigis ĝin. Sed unue ni tajpu kelkajn vortojn. Ni produktu, ekzemple, tiun ĉi tekston:

Ĉio en Esperanto ŝajnas pli bele.

He, haltu! Kie diable estas la supersignoj? Ĉevalbatalo de esperantistoj ekde kiam komputiloj aperis, ĉu ne? Nu, mi diros al vi sekreton: musklaku la eron *Sistemo* en la supra baro, kaj elektu *Preferojn*, kaj poste, el aperanta menuo, elektu la trian lastan eron, *Klavaro* (teclado). En la aperanta fenestro, elektu *Distribuadon* (distribuciones) kaj en la nova

fenestro oni vidos nur la vorton *España*, kaj dekstre al ĝi simbolo sub la vorto *Predeterminado* (antaŭdifinita). Ni premu la virtualan klavon *Añadir* (aldoni), kaj novan klavon virtualan *Capas* (tavoloj). El longa listo ni serĉu ne landon, sed la vorton *Esperanto*, kiu troviĝas inter *España* kaj *Estonia*. Maldekstrmusklaku sur ĝi, kaj poste klavojn virtualajn *Añadir* kaj *Cerrar*. De nun, ĉiam, kiam ni premu la klavon x, aperos ĉ, kaj simile la klavoj q, w, y, produktas ŝ, ĵ kaj ĝ, kaj ñ produktas ŭ, kaj ´ produktas ĥ. La koncernaj majuskloj ankaŭ aperas. Nun ni jam povas verki niajn grandajn legindaĵojn en Esperanto! Sed notu, ke se oni deziras uzi nomojn en la hispana, kiu havas akcentitajn vokalojn aŭ ñ, oni devas reveni en la *hispanan* distribuadon. Ĉar tiu procedo estas tediga por fari eble nur unu literon, kaj poste reveni en la esperantan distribuadan, oni povas fari ion aldonan: sur la plej alta baro, ni dekstromusklaku kaj elektu la unuan eron, *Aldonu al baro* (añadir al panel), kaj poste serĉu kaj elektu *Indicador de teclado* (indikilo pri klavaro), kaj ni vidos la vorton *Esp* (hispana) aŭ *Epo* (Esperanto). Reklakante tie, oni povas ŝanĝi la klavaron. Atentu, ke dum ni uzas la esperantan klavaron, la *aliaj* signoj sur nia klavaro ne nepre validos. Ekzemple, por tajpi ? ni devas vere premi _ (plej dekstromalaltan pozicion en la hispana klavaro, apud la majuskla ŝanĝilklavo). Oni memoru ne uzi supersignojn por la nomo de la dosiero, per kiu oni konservos sian laboron.

La venontan fojon ni parolos pri kion fari kun teksto per programoj en tiu ĉi mirinda pakajo.



Bjalistoko,
sidejo de la venonta
UK je 25^a julio al 1^a
de aŭgusto

Ĉikilikŭatra Hispanio

Antaŭ kelkaj monatoj reprezentis Hispanion ĉe Eŭrovisio kanto Ĉiki-ĉiki, kantite de histrionisto Ĉikilikŭatre (Chiquilicuatre), klaŭno laboranta en hispana televidprogramo. Mi memoras, ke kiam lian kanton oni elektis, mi aŭdis diri: *Estas honto por Hispanio esti reprezentita*



de tiu kanto, de tiu homo! Mi tuj vidis, ke ŝi, la dirinto, ne pravas. Mi aŭtomate ekdiris: Same kiel de ZP. Sed diferenco grava estas, ke niaj poŝoj suferos multe malpli de la reprezentado de Ĉiki-likŭatre ol las misfaraĵoj de Zapatero.

Fakte ni jam vidis, ke la fama *egaleco de seksoj* ĉe ministrejoj signifas, ke estas pli da virinoj ol viroj. ke *bona ekonomio* signifas, ke pli ol kvar milionoj da laboristoj ne plu havas postenon, kaj ke *paco* signifas, ke pli da soldatoj iras al la milito de Afganio kaj aliaj lokoj, inkluzivante Irako (**Ne al milito!**), kie hispanaj militŝipoj apogas la fian usonan mararmeon. Oni esperis, ke almenaŭ malefikajn ministrojn oni maldungos, sed ni vidas, ke ministrino María Elena (*Maleni*) Álvarez daŭre estis ministro ĝis multaj monatoj post la sekvoj de ŝia ne antaŭvido pri tio, ke la metroo de Barcelono subteriĝos kaj trajnoj ne plu funkciis en Barcelono dum monatoj.

Kaj kape de la Ministerio pri Defendo estas Ministrino Ĉakon', pacema virino, kiu restas kvar monatojn for el siaj devoj pro tio, ke ŝi naskis bebon, male al tio, kio estas antaŭvidita por simpla soldatino. Jen egaleco ruĝa.

Oni ne atendis dum 40 jaroj maldesktron por tio.

Sed ne ploru ni: jen tio, kion Hispanio elektis. Kaj Ĉiki-ĉiki-kaj ZPn. Sekve tio, kion Hispanio meritas. Iomete modifante la faman frazon de Fernando Trueba, fama filmisto hispana, *Pri Hispanio, la plej bona afero estas tiam, kiam oni eliras ĝin*¹.



¹Fakte la frazo estis: *Pri la universitato, la plej bono estas tiam, kiam oni forlasas ĝin.*

Sennaciismo



Sennaciismo estas simpatia ideo al mi. Tamen, tro juna en la homa vivokonduto por krei veran vivoebloon, ne paroli pri vivomaniero, oni ankoraŭ ne povas adopti tiun sintenon, sen fali en fiajn perversaĵojn, kiujn ni ĉiuj konas.

Pro tio mi reripensis kaj ankoraŭ re-pensas mian sennaciismon. Certe mi jam konsciiĝis pri la neebleco de alies sennaciismo de la momento, kiam mi estis maljuste kaj mallerte eksigita el la memkonsiderata *sennacia asocio* SAT.

Mi retrovis la fian manon, kiu movigis la asocion eksigi tutan asocion, HALEn, por eksigi min, simplan homon, kiu neniam faris malbone al iu ajn, dum la lasta Universala Kongreso en Rotterdamo. Mi preterrigardis lin, lasante sian rideton vidi vakuon, ne havante ion ajn diri al li, kaj decidante, ke tiu viktimo de li mem havas nenion diri al mi. Evidente homoj ne havas la gravecon, kiun ili mem postulas aŭ konsideras, ke ili indas, sed tiun, kiun oni donas al li aŭ ŝi pro ia ajn kialo. Tial SAT havas nenion gravan, kaj jam tedas kaj ĝenas al mi tiun egan kaj nemerititan gravecon donitan al mi de SAT en la estinto. Tiom, ke mi ne plu agnoskos ĝian aŭtoritaton diri tion al mi.

Iam muslimoj kverelis inter si kreinte tajforegnoj, kaj unuiĝintaj kristanoj povis venki kaj forpuŝi ilin el la tuta lando. Nun, ses jarcentojn poste, la kristanoj senkristaniĝis sed tamen kreteniĝis sufiĉe por batali najbarojn tiel ke dume muslimoj denove venas inter ili kaj kreas moskeojn kaj postulas respekton al sia kulturo, dum ili tion ne faras ĉe iliaj originlandoj.

Tamen, ne estu mia artikolo legita kiel sopiro al kristaneco, sed al hispaneco, ĉar ne kristano, sed hispano estas mi. Kristanismo estis, siatempe, la kerno de la gluo, kiu unuigis la homojn, kiuj kreis Hispanion. Hodiaŭ estas, tamen, aliaj valoroj kaj ideoj respektindaj en nia civilizacio, krom amo al najbaro: respekto al homaj rajtoj, ekzemple, libereco pensi kaj sinesprimi, kaj komune agadi cele al solvado de komunaj problemoj. Sed kio malebligas tion?

Ĉefe la Konstitucio Hispana de 1978. Mi pretas konsenti, ke ĝi ja estis plibono al tio, kio ekzistis antaŭ ĝi, sed tio ne nepre signifas, ke ĝi estas bona, ĉar ĝi enhavas kernon de detruo de Hispanio, pere de la tiel nomitaj *aŭtonomioj*. Ne la homoj bezonas aŭtonomion, sed politikistoj. Sed tiajn politikistojn la homoj de Hispanio ne bezonas. Ni estas malgranda kaj negrava lando, kies ekonomio ne povas permesi al si pagi dek ok registarojn, dek ok parlamentojn, kaj dek ok gefunkciularojn. Parlamentoj en Hispanio ne signifas, ke oni parolos kaj konvinkos aliajn honestajn homojn pri tio, kion oni devas fari interese al la popolo reprezentata. Paroladoj malmankas, ĉar poste oni faros nur tion, kion la gvidantoj de la koncernaj partioj jam decidis. Ili uzas la *partian disciplinon* por ne permesi al siaj deputitoj voĉdoni

honeste, sed obee al partio. Por tio ni ne bezonas parlamentojn. Eĉ ne unu. Aldone, diverseco da aŭtonomio produktis nur kverelojn nebezonatajn, kiel tiu pri akvo inter akvoriĉaj kaj soifantaj aŭtonomioj, kreante malsolidareco ene de Hispanio.


Kelkaj homoj, kiuj konas min delonge certe miros, ke mi parolas pri hispaneco, hispaneco mia, ĉar mi ofte fieris pri mia *sennacieco*. Mi daŭre konsideras, ke peco da tero havas nenion povon sur min, kaj neniam havos. Mi fakte opinias, ke tio estas stulta penso. Homoj de ĉiuj partoj de la mondo estas egalaj, esence. Tamen, ekzistas diverseco pri kulturo, lingvo, kaj penso laŭ la loko, kie ili naskiĝis. Sed la pejzaĝo ne tiom multe respondecas pri tiu diverseco, kiom la lingvo kaj historio de la homoj, kiuj loĝas en la koncernaj partoj de la mondo. Pro tio endas, ke la homoj, kiuj vivas en la sama loko, kaj sekve havas samajn problemojn, organiziĝu. Hodiaŭ ekzistas mirindaj komunikiloj, kiuj ebligas organiziĝi en vastajn organizaĵojn, kiel Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko..., sed tamen la homoj estas balastitaj por atingi tion, de la samaj eroj, kiuj ĝis nun helpis ilin organiziĝi: lingvo, kulturo, manieron vivi. Eŭropo ankoraŭ estas utopio, krom por turismo kaj ekonomio. Iom post iom ni solvos interrilataj problemojn, sed dum nia eŭropa rilato iĝos sufiĉe forta, restas nur hispaneco nia forigi malsolidarecon inter ni. Ni estu hispanoj pro tio, ke ni ankoraŭ ne povas esti eŭropanoj. Preterhispanan solidarecon oni ne helpas krei per subhispana malsolidareco. Francoj ne hontas esti francoj, germanoj ne hontas esti germanoj, italoj ne hontas esti italoj. Kial do, ni havu tiun malsolidaran senton ne senti nin hispanoj, sed aŭtonomanoj? Kiam komprenos ni, ke tiu vilaĝismo endanĝerigas nian kulturon kaj manieron vivi, ne diri eĉ simple vivi?

Jesuo

La faraono

Ĉapitro 23^a

Nun en la urbo Anu komenciĝis serio da festenoj kaj amuzoj.



Ramzes venigis el siaj keloj bonajn vinojn, el tri najbaraj nomesoj venis plej belaj dancistinoj, plej famaj muzikistoj, plej lertaj artifikistoj. La tempo de Ramzes estis perfekte plenigita. Matene la ekzercado de soldatoj, kaj akcepto de altranguloj, poste festenoj, spektakloj, ĉasoj kaj ree festenoj.

Sed en la momento, kiam la nomarĥo de Hak estis certa, ke la kronprincon jam tedis la administraj demandoj kaj vizitoj de altranguloj, Ramzes alvokis lin kaj demandis:

—La nomeso de via ekscelenco apartenas al la plej riĉaj en Egipto?...

—Jes... kvankam ni havis kelke da malfacilaj jaroj...— respondis Ranuzer, kaj ree glaciĝis lia koro kaj ekstremis liaj genuoj.

—Ĝuste tio mirigas min —diris la princo —ke de jaro al jaro plimalgrandiĝas la enspezoj de lia sankteco. Ĉu vi ne povus klarigi tion al mi?

—Sinjoro —diris la nomarĥo, klinante la kapon ĝis la tero. —Mi vidas, ke miaj malamikoj semis malkonfidon en vian animon; kion ajn mi dirus, tio ne konvinkus vin. Permesu do al mi tute ne paroli; pli bone estos, se venos ĉi tien skribistoj

kun dokumentoj, kiujn vi povos tuŝi per via propra mano kaj kontroli...

La kronprincon iom mirigis la neatendita eksplodo, sed li akceptis la proponon. Li eĉ ekĝojis. Li pensis, ke la raportoj de la skribistoj klarigos al li la sekretojn de la administrado.

La sekvintan tagon venis la granda skribisto de la nomeso Hak kaj liaj helpantoj kun kelkdeko da papirusaj volvaĵoj, kovritaj de ambaŭ flankoj per skribaĵoj. Kiam oni malvolvis ilin, ili formis rubandon tri manojn larĝajn kaj sesdek paŝojn longan. Unuafoje la princo vidis tiel grandegan dokumenton, en kiu estis priskribo nur de unu provinco kaj dum unu sola jaro.

La granda skribisto sidiĝis sur la planko, krucinte la kruojn, kaj komencis:

—En la trideka jaro de la regado de lia sankteco Mer-Amen-Ramzes malfruis la leviĝo de Ni-
lo... La kampanoj, kredante, ke la malfeliĉon kaŭzis sorĉoj de la fremduloj, loĝantaj en la provinco Hak', komencis detruigi la domojn de la nefidelaj hebreoj, ĥetoj kaj

fenicanoj, kaj oni mortigis kelke da personoj. Laŭ ordono de la nomarĥo oni kondukis la kulpajn al la tribunalo; dudekkvin vilaĝanojn, du masonistojn kaj kvin ŝuistojn oni kondamnis en minejojn, kaj unu fiŝiston oni sufokis...

—Kia dokumento estas tio? —interrompis la princo.


—Tio estas juĝa raporto, destinita esti metita antaŭ la piedoj de lia sankteco.

—Lasu ĝin kaj legu pri la ŝtataj enspezoj.

La helpantoj de l' granda skribisto volvis la forpuŝitan dokumenton kaj prezentis alian. Ilia estro ree komencis legi:

—En la kvina tago de l' monato Tot oni liveris en la reĝajn grenejojn sescent mezurojn da tritiko, kiujn kvintancis la ĉefa intendantanto.

«La sepan de Tot la granda trezoriŝto eksciis kaj kontrolis, ke malaperis el la provizoj de la lasta jaro cent kvardek ok mezuroj da tritiko. Dum la kontrolo du laboristoj ŝtelis



Dancistinoj de malnova Egipto estis belaj kaj flekseblaj.

unu mezuron da tritiko kaj kaŝis ĝin inter brikoj. Kiam oni rimarkis tion, ili estis transdonitaj al la juĝejo kaj kondamnitaj en la minejojn pro la atenco kontraŭ la propraĵo de lia sankteco...»

—Kaj la cent kvardek ok mezuroj?— demandis la kronprinco.

—Musoj formanĝis ilin— respondis la skribisto kaj daŭrigis:

—La okan de Tot oni alsendis dudek bovinojn kaj okdek kvar ŝafinojn en la buĉejon, kiujn la gardisto de bovoj ordonis doni al la regimento Nizo, je kvitanco...

Tiamaniere la vic-reĝo sciiĝadis, tagon post tago, kiom da hordeo, tritiko, fazeolo kaj lotusaj grajnoj oni liveris en la grenejojn, kiom oni transsendis en la muelejojn, kiom oni ŝtelis kaj kiom da laboristoj pro tio oni kondamnis en la minejojn. La raporto estis tiel enuiga kaj senorda, ke en la mezo de l' monato Paofi la princo ordonis interrompi la legadon.

—Diru al mi, granda skribisto — demandis Ramzes — kion vi komprenas el tio?... Kion vi eksciis?...

—Ĉion, kion ordonos via ekscelenco...

Kaj li rekomencis, sed jam parkere:

—La sepan de l' monato Tot oni liveris en la reĝajn grenejojn...

—Sufiĉe! — ekkriis kolere la princo kaj ordonis al li iri for.

La skribistoj falis sur la vizaĝon, poste rapide forprenis la papirusojn, ree falis teren kaj galope elkuris.

La princo alvokis la nomarĥon Ranuzer. Li venis kun la brakoj krucitaj sur la brusto, sed kun trankvila mieno, ĉar li eksciis de la skribisto, ke la princo povas nenion kompreni el la raportoj kaj ke li eĉ ne aŭskultis ilin ĝis la fino.

—Diru al mi, via ekscelenco — komencis la kronprinco — ĉu ankaŭ al vi oni legas la raportojn?

—Ĉiutage...

—Kaj ĉu vi ilin komprenas?

—Pardonu, plej nobla sinjoro, sed... ĉu mi povus administri la nomeson, se mi ne komprenus tion?

La princo malĝoje ekmeditis. Eble, efektive, li estas tiel malkapabla?... Kaj tiam — kiel li povos fariĝi monarĥo?...

—Sidiĝu— diris li post momento, montrante al Ranuzer seĝon. — Sidiĝu kaj rakontu al mi: kiel vi administras la nomeson?...

La nomarĥo paliĝis kaj liaj okuloj turniĝis supren, montrante la blankon. Ramzes rimarkis tion kaj komencis klarigi:

—Ne pensu, ke mi ne konfidus al via saĝo... Kontraŭe, mi ne konas homon pli kapablan ol vi al la administra ŝarĝo... Sed mi estas juna kaj scivola: kio estas la arto de l' regado? Mi do

petas vin, dividi kun mi iom da via sperto. Vi administras la nomeson — mi scias pri tio!... Sed nun klarigu al mi, kiel oni administras?

La nomarĥo ekspiris kaj komencis: —Mi rakontos al vi la tutan fluon de mia vivo, por ke vi sciu, kiel malfacila estas mia laboro.

«Matene, post la bano, mi faras oferojn al la dio Amut kaj poste mi alvokas la trezoriston kaj demandas lin: ĉu konvene alfluas la impostoj por lia sankteco? Se li diras al mi, ke jes, mi laŭdas lin; se li diras, ke tiuj aŭ tiuj ne pagis, mi ordonas aresti ilin.

«Poste mi alvokas la gardiston de la reĝaj garbejoj por scii, kiom da nova greno ni havas. Se multe, mi laŭdas lin; se malmulte, mi ordonas vipi la kulpajn.

«Poste venas la granda skribisto kaj diras: kion el la bienoj de lia sankteco bezonas la armeo, oficistoj kaj laboristoj, —kaj mi ordonas liveri tion je kvitanco. Se li donas malpli, mi laŭdas lin; se pli multe, mi komencas juĝan esploron.

«Post la tagmezo venas al mi la feniciaj komercistoj, al kiuj mi vendas grenon, kaj la monon ili pagas en la trezorejon de l' faraono. Poste mi preĝas kaj konfirmas la juĝajn verdiktojn, kaj antaŭ la vespero la polico raportas pri la okazoj de l' tago. Antaŭ hieraŭ, ekzemple, loĝan-

toj de mia nomeso invadis la teritorion de la provinco Ka kaj sakrilegis la statuton de l' dio Sebak. En mia koro mi ekĝojis, ĉar li ne estas nia patrono; tamen mi kondamnis kelkajn kulpajn al la sufoko, multajn en la minejojn, ĉiujn al la bastonado.

«Tiel en mia nomeso regas la trankvilo kaj bonaj moroj, kaj la impostoj alfluas ĉiutage».

—Tamen la enspezoj de l' faraono plimalgrandiĝis ankaŭ ĉe vi —intermetis la princo.

—Vi diris la veron, sinjoro— ekspiris Ranuzer. —La pastroj diras, ke la dioj ekkoleris kontraŭ Egipto pro la alfluo de l' fremduloj; sed mi vidas, ke eĉ la dioj ne malamas la fenician oron kaj iliajn multvalorajn ŝtonojn....

En ĉi tiu momento eniris serva oficiro kaj post li la pastro Mentzufis, por inviti la vic-reĝon kaj nomarĥon al publika diservo. Ambaŭ konsentis, kaj la nomarĥo Ranuzer montris tiom da pieco, ke la princo ekmiris.

Kiam Ranuzer, profunde sin klinante, foriris, la vic-reĝo diris al la pastro:

—Sankta profeto, vin, kiu estas ĉe mi la anstataŭanto de la plej respektinda Herhor, vin mi petas, klarigu al mi unu aferon, kiu plenigas mian animon per maltrankvilo.

—Ĉu mi scios?— respondis la pastro.

—Respondu, ĉar la saĝo plenigas vin, kies servisto vi estas. Konsideru nur, kion mi diros al vi. Vi ja scias, por kio min sendis ĉi tien lia sankteco...

—Por ke vi, princo, koniĝu kun la riĉaĵoj kaj kun la administrado de la lando— interrompis Mentezufis.

—Mi faras tion. Mi demandas la nomarĥojn, mi rigardas la landon kaj homojn, mi aŭskultas raportojn, sed —mi komprenas nenion; tio venenas mian vivon kaj mirigas min.

«Ĉar en la militaj aferoj mi scias ĉion: kiom mi havas da soldatoj, ĉevaloj, veturiloj; kiuj oficiroj drinkas aŭ malzorgas la servadon, kaj kiuj honeste plenumas sian devon. Mi scias ankaŭ, kiel uzi la armeon. Se sur ebenaĵo starus malamika korpuso, mi devus preni du korpusojn por venki ĝin. Se la malamiko okupus defendan pozicion, mi ne moviĝus sen tri korpusoj. Se la malamiko estas neekzercita kaj batalas en senordaj amasoj, kontraŭ lia milo mi povas starigi kvincent niajn soldatojn kaj mi venke batos ilin. Se la kontraŭulo havas mil hakilistojn, kaj mi mil, mi min ĵetos sur lin kaj mi lin venkos, se mi havos helpe cent ŝtonĵetistojn.

«En la armeo, sankta patro— daŭrigis Ramzes —oni vidas ĉion,

kvazaŭ la fingrojn de l' propra mano, kaj por ĉiu demando oni havas pretan respondon, kiun mi plene komprenas. Sed en la administrado de la nomesoj mi ne nur vidas nenion, sed havas tian ĥaoson en la kapo, ke iafoje mi forgesas, por kio mi venis ĉi tien?

La sankta profeto ekmeditis.

—Ĉu ili kuraĝus trompi vian ekszellencon— respondis li —mi ne scias, ĉar mi ne observis iliajn agojn. Sed ŝajnas al mi, ke ili povas nenion klarigi al vi, ĉar ili mem komprenas nenion.

«La nomarĥoj kaj iliaj skribistoj— daŭrigis la pastro —estas kiel la dekestroj en la armeo: ĉiu konas sian dekon kaj informas pri ĝi la superajn oficirojn. Ĉiu komandas sian taĉmenton. Sed la ĝeneralan planon, kiun faras la militestroj, la dekestro ne konas.

«La nomarĥoj kaj skribistoj notas ĉion, kio okazas en la provinco, kaj transsendas ĉi tiujn raportojn al la piedoj de l' faraono. Sed nur la plej alta konsilistaro eltiras el ili la mielon de l' saĝo».

—Ĝuste ĉi tiun mielon mi deziras... —ekkriis la princo. —Kial oni ne donas ĝin al mi?...

Mentezufis ekskuis la kapon;

—La ŝtata saĝo— diris li —apartenas al la pastraj misteroj: ĝin povas

akiri nur homo, dediĉita al la dioj. Kaj via ekscelenco, kvankam edukita de la pastroj, plej malkaŝe foriĝas de l' temploj...

—Do se mi ne fariĝos pastro, ĉu vi ne informos min?...

—Estas aferoj, kiujn via ekscelenco povas ekkoni eĉ nun, kiel *erpatre*, estas tiaj, kiujn vi ekkonos, kiel faraono. Sed ekzistas tiaj, kiujn povas scii nur ĉefepiskopo.

—Ĉiu faraono estas ĉefepiskopo?— interrompis la princo.

—Ne ĉiu. Kaj eĉ inter ĉefepiskopoj ekzistas diferencoj.

—Do— ekkriis kolere la kronprinco —vi kaŝas de mi la administradon de l' ŝtato!... Kaj mi ne povos plenumi la ordonojn de mia patro?...

—Tion— diris trankvile Mentezufis —kion vi bezonas, vi povas ekkoni, ĉar vi havas la unuajn pastrobenojn. Sed ĉi tiuj aferoj estas kaŝitaj en la temploj, post kovrilo, kiun neniu kuraĝus forigi sen konvenaj preparoj.

—Mi, mi forigos ĝin!

—La dioj gardu Egipton de tia malfeliĉo!— respondis la pastro, etendante la manojn al la ĉielo. —Ĉu vi ne scias, ke la tondro mortigus tiun, kiu sen konvenaj preĝoj tuŝus la kurtenon? Ordonu, princo, konduki en la templon iun

sklavon aŭ kondamniton, li nur etendu la manon, kaj li tuj mortos.

—Ĉar vi mortigos lin.

—Ĉiu el ni mortus same, kiel plej ordinara krimulo, se li sakrilege proksimiĝus al la altaro. Antaŭ la dioj, mia princo, faraono kaj pastro valoras tiom, kiom sklavo.

—Kion do mi devas fari?... — demandis Ramzes.

—Serĉi en la temploj respondon al viaj duboj, puriginte sin per preĝoj kaj fastoj —respondis la pastro. — De kiam ekzistas Egipto, neniu monarĥo alimaniere akiris la ŝtatan saĝon.

—Mi pripensos —respondis la princo. —Tamen mi vidas, ke la plej respektinda Mefres kaj vi, sankta profeto, volas entiri min en la diservojn, kiel mian patron.

—Tute ne. Se vi, kiel faraono, volus nur komandi la armeon, vi povus nur

kelke da fojoj jare partopreni en la diservoj, en la ceteraj okazoj vin anstataŭus la ĉefepiskopoj. Sed se vi volas ekkoni la misterojn de l' temploj, vi devas honori la diojn, ĉar ili estas la fonto de la saĝo.





Kajeroj

el la Sudo



**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ
ESPRANTISTAJ (HALE)**

**REDAKCIO: c/Jabonerías, 6-3^{UD},
ES30 001, Murcia.
HISPANIO**

Tfn° (00 34) 615
427 143

**Retskribu al
jesuo@ono.com**

<http://www.gazetotekolanti.com/hale/k77.pdf>



**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.
ISSN1697-6460**